# HEJS

JUNULARA SEKCIO

HISPANA ESPERANTO FEDERACIO

Nro. 53 - 1967

REDAKTORO: Sro. J. M.ª SERRANO
Merceria, 7, 3.º - TARRAGONA (Hispanujo)





DUM SEP JAROJ LA "INTERNACIA FOIRO DE BARCELONO"
ELDONIS AFIŜOJN EN ESPERANTO

# CASAL VILAFRANCA ESPERANTO-GRUPO

Oni okazigas Esperanto-kurson marde kaj vendrede de la 8'30 ĝis la 9'30 vespere.

VILAFRANCA DEL PENEDES havas 14.000 loĝantojn kaj ĝi kuŝas apud la monto Sant Miquel kun eltrovitaj prahistoriaj tomboj. Je 16 kilometroj estas la bela marborda urbo Sitges kaj je la sama distanco oni trovas la industria Vilanova i La Geltru, banita per la Mediteranea maro.

Oni povas admiri en la ĉirkaŭaĵoj de Vilafranca la jenajn vidindaĵojn: Sant Marti Sarroca kun antikva preĝejo romanida kaj vizitinda kastelo de la jaro 1.400. Ankaŭ romanida preĝejoj en Moja (Olèrdola) kaj Sant Sebastiá dels Gorgs, kaj ravaj monumentoj en Foix kaj Castelvi de la Marca.

Krom la menciitaj mirindaĵoj oni preskaŭ devige devas viziti la Muzeon de la Vino, en la urbo Vilafranca, unika en la mondo; la Katedralon en kies kripto ekzistas Llimona skulptaĵo; la monumentojn al la Vino kaj al "Xiquets" (Homaj Turoj).

Ankaŭ plezure ni prezentas kelkajn el niaj membroj kun la propraj okupoj:


SOGAS.—Komerco de ruĝaj kaj blankaj vinoj en karafoj aŭ boteloj en specialaj skatoloj, laŭ deziroj. Str. Duque de la Victoria, 33. T. 70.

Ĉarpentisto TORNER.—Mebloj kaj lignaĵoj por la domkostruado. Meĥanika laborado. Str. Ramón Freixas, 34.

Presisto VIVES.—Presejo kun la supersignitaj Esperanto - literoj. Str. Balmes, 8. T. 675.

Restoracio DOMINGO.—Inda pro la servo kaj bongustaj manĝaĵoj. Promenejo San Francisco, 13. T. 219.

Filatelisto PLANS.—Interŝanĝo de poŝtmarkoj. A. 1.

Aŭtomobiloj JOSEP PERELLO.— Ekskluziva agento de la aŭtomobiloj CITROEN kun meĥanika servo. Disdonisto de la pneŭmatikoj MICHELIN kaj PIRELLI. Str. Calvo Sotelo, 57. T. 463.

## 4 CONCURSO DE ORATORIA JUVENIL

Entre los actos a desarrollar durante el 28 Congreso Español de Esperanto en Zaragoza destacan por su interés para con la juventud la reunión anual de los socios juveniles, en la cual la Junta de HEJS expondrá a todos los participantes los últimos logros de la Residencia Juvenil y a la aprobación de los asistentes el nuevo plan de trabajo para la Celebración del Congreso Juvenil Internacional de TEJO en Tarragona. Pero el acto cultural más importante es sin duda el consurso de oratoria, pues en el se muestra el grado linguistico de los jóvenes. Para facilitar la participación de los congresistas ampliamos la edad de los participantes hasta los 28 años. Rogamos a todos los interesados sirvanse enviar su inscricción a la Srta Secretaria de la Federación Inés Gastón, Marina Moreno 35-4 Zaragoza .

-o-o-o-o-o-o-o-

## STAND DE ESPERANTO EN LA FERIA INTERNACIONAL DE MUESTRAS DE BARCELONA

Por fin Histituto Español de Esperanto logró un deseo largo tiempo sentido disponer para Esperanto un stand en la feria más importante de España, gracias a su coordinación con los representantes del certamen ha sido posible la organización de un stand, muy bien situado.

-o-o-o-o-o-o-o-

INVITAMOS A TODOS LOS SOCIOS Y SIMPATIZANTES DE HEJS A LA VERBENA DE SAN JUAN Y LOS DIAS 24 y 25 VISITAR LA RESIDENCIA JUVENIL EN MONISTROL LA CUAL YA ESTÀ CONSTRUIDA. Asi pues vuestra Residencia Juvenil Esperantista es ya una realidad

-o-o-o-o-o-o-o-

## NUR KELKAJ VORTOJ

Nia ekskurso de la 26ª de marto,similis al neniu el la antaŭaj ĉar la programo anoncis: viziton al Restadejo de Hispana Esperantista Junularo.Entuziasme kaj scivoleme ni veturis al Monistrol de Montserrat,ĉar en la ĉirkaŭaĵo de ĉi tiu urbeto situas Nia Hejmo;kaj verdire ni revenis pli entuziasmiĝintaj ol ni foriris sed ne plu scivolemaj ĉar ĝuan realon ni konstatis tie.

Por tiuj kiuj ne konas ĉi tiun parton de la kataluna regiono,jam povas ekĝui de tiel bela panoramo.En la fono troviĝas la famega monto Montserrat,aliflanke la rivero Llobregat kaj la pitoreska urbeto Monistrol.

Nia restadejo jam estas atingebla per trajno, ĉar ekzistas du stacidomoj,aŭ tra aŭtoŝoseo.

Sed aparte de tiuj vidindaĵoj,kion reprezentas por la hispana esperantistaro la realigo de tiel bela revo ?.Mi ĵus alveninta ekpensis pri rol• kiu estas rezervota al ĝi kaj mi iluziiĝis,mi image vidis homojn en esperantista etoso en Esperantujo,mi jam antaŭsentis ridojn,kantojn de gejunuloj el diversaj landoj por kiuj esperanto,la interkomprenilo kiu feliĉigos ilin dum la tuta vivo,ĉar travivos neforgeseblajn momentojn.

La starigo de la Retsdejo estas grandioza paŝo por nia enlanda movado kaj estas ni,hispanoj,kiuj devas varme labori por ke la sukceso estu ofta kaj daŭra.Ekde nun nia rendevuejo estas en Monistrol ĉe nia ripozejo;jes.mi pensas je vi kiu loĝas malproksime,ĉar certe vi ĝuos la plezuron malkovri ĉi tiun bentrindan terenparton,krome,vi trovos jam en la restadejo tion por kio vi batalas,pacon kaj

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-•-

kamaradecon,vi povas pasigi tie vian ferion kie ne negociisto atendas vin,sed nur amikoj,samideanoj.

Jes,la paŝo estas granda sed multe restas farenda,tiamaniere pensis la tuto de vizitintoj inter kiuj troviĝis tri francaj gejunuloj,tial ke la unua internacia restado jam apartenas al pasinteco.

Multe oni povas skribi pri tiel grava evento;tamen permesu ke mi finu per ĉi tiu esperplena poeziaĵo

Ĝoju vi,ĝoju ni
ĝoju la tuta
esperantista famili'
ĉar en Monistrol de Montserrat
ripozejon havas jam
la hispana esperantista junular'

Sabadell - Luis Serrano

^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^
^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^

ATENTON GESAMIDEANOJ

Pro diversaj problemoj de nia HEJS-Delegacio en Barcelono,kun bedaŭro ni informas al vi la fermon de nia tre kara HEJS-Delegacio en la sidejo de "RADIO CLUB CATALUÑA"ĉar la menciita klubo fermas sian aktivecon.Tiel do ni petas ĉiuj estraranoj ne sendu al la antaŭ adreso str.Casanova 57-6 Barcelono pliajn informojn

Bonvolu atendi ĝis la reorganizado de nova sidejo.Provizore ni invitas ĉiuj HEJSanoj de Barcelono kunveni en la sidejo de Hispana Esperanto Hinstituto,plaza España 4 etaĝo .

))))))))) HEJS-Estraro

## LA TUNGUZO PREĜAS

Mi petegas,
Barguzin'ĉiopova,
ke vi flugu
for de nia Bajkul',
la lago jam estu serena
senblova-
helpu, helpu
al la tunguza fiŝkaptul'.
Mi promesas al vi
multkolorajn
oferojn el perlo kaj el brila ŝton',
prenu, jen
ornamaĵojn valorajn,
nur helpu,helpu al mia bezon'!
Trompas nin
la ruzaj ŝamanoj
la tunguzo suferas en silent'.
Min atendas en tendo la infanoj
sen nutraj'...
Silentu, ho vent'!
Mi elnaĝos en la lagon sub velo,
la fiŝreton mi tiros sur lokoj,
kie estas pli ol sitelo
da bongustaj angiloj,ezokoj,
Mi petegas,
Barguzin'ĉiopova,
ke vi flugu
for de nia Bajkul',
la lago jam estu serena,
senblova,
helpu,helpu
al la tunguza fiŝkaptul'!

Aleksandro Logvin
Ĉita, 1928

Tradukis.Johano Velez

## PER ESSER QUELCOM DEMA

El dolor em va fent
com l´escultor
quan talla
el marbre
el fa escopir a poc a poc
tota la seva bellesa.

El dolor em va punxant
amb sa escarpre tan fina i monótona,
i entre sanglot i sanglot
va passant a la brossa
trossos de la meva carn.

Peró quan sembla que la figura es prou bella
l´escarpra punxa més endins, i la sang
torne a brollar,
i els sanglots intermitents carreguen
les seves piles
tornant a pujar a la boca.

El dolor em va fent
com l´escultor
quan talla
el marbre
el fa escopir a poc a poc
tota la seva bellesa.

FRANCESC VALLS

)0)0)0)0)0`0)0)0)0)0)0)0)0)

NOTO DE LA REDAKCIO: La enhavo de la artikoloj esprimas la opiniojn de la aŭtoroj, ne de la redaktoro aŭ HEJS

6-6-6-6-6-6-6-6-6-6-6-6-6-6-6-6-6-

## AL LA JUNULARO

Karaj gejunuloj; Vi kiuj en la morgaŭa tago devos gvidi kaj regi viajn hejmojn kaj ankaŭ la Ŝtaton (tio estas laŭ viaj kapabloj).Por gvidi bone hejmon,unue estas dece studi ion pri kio estas la vivado de la infaneco ĝis la maljuneco.

Tio ampleksas tri etapoj; la unua la infaneco la dua la juneco kaj la tria, la maljuneco.Do,estante ni junaj ankoraŭ,ni devas pripensi kio estas hejmo Hejmo,pli bone nova hejmo,kiu kreiĝas kiam paro da gejunuloj geedziĝas,ili devas esti pretaj por subteni la novan hejmon humilan.Antaŭ ĉio,kiam vi estos kreante vian hejmon vi devos liveri,ne elspezi pli ol la hejma enspezadoĉar tio estas granda regreso.Do por ke tio ne estu tiel,la gejunuloj antaŭ geedziĝi devas iri al la ĉefaltaro pretaj,havante scieron pri la hejma mastrumado.Ankaŭ la nova edzo devas esti laborema kaj studema por progresi pli,sed ankaŭ ne estas plie esti religiema,akurante ofte iun dimanĉan diservon kie vi povos interrilati kun novaj geamikoj ,kiuj estas necesaj por ricevi bonajn konsilojn.Mi ankaŭ rekomendas al vi legu bonajn librojn kiuj vekigu viajn dormantajn mensojn.Sekvinte tiel kiel mi priskribis,vi tiam estos pretaj por krei vian familian hejmon.

Vi iam estos geedziĝita;se vi mastrumas bone kaj ŝparas sed sen difekti vian junan fortan sanecon rigardante ion por la morgaŭa tago ,al vi nenio mankos,ĉar ĉiu antaŭvidanta homo kaj kun la helpo de Dio li jam povos iri antaŭen malgraŭ ĉiaj aflikoj kiuj povas ĉeesti dum la unuaj geedzaj jaroj en kiuj venas la filetoj.Pri la infanoj mi konsilus al la novaj geedzoj (eble tio al mi ne estos permesata) sed malgraŭ tio,mi devas sprimi tion kio eliras de mia menso. Do mia konsilo estas ke la novaj geedzoj ne havu pli

ĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉ

da du filojn,ĉar la Homaro venis al epoko kie jam ne estas sufiĉe da manĝaĵo por nuti la tutan homaron.Ni devas pensi,ke estas prokrastitaj landoj kia la mizero estas grandega ĉar ne estas sufiĉe da nutraĵoj por alimenti tiom da enloĝantoj.En tiuj landoj vere naskiĝas la infanoj kiel formikoj;sed la formikoj estas laboremaj kaj magazenas somere siajn nutraĵojn por la vintro.Do la homaro,kies intelekto superas tiun de la neraciaj animaloj,devas travivadi pli espirituale ol la karnaj deziroj,agante tiel nian vivadon harmonie, pace kaj ame kun nia similulo.Tiam nia idaro kaptos niajn bonajn ekzemplojn kaj kreskos sanajde fizika korpo kaj animo.Mi rekomendas al la gepatroj ke ili ne aĉetu por siaj karaj gefiloj ludilojn kiuj estu armiloj:kirasoj,glavoj,revolveroj,pafiloj,ktp.sed tiujn kiuj estas instruantaj:skatolo de mekanikpecaĵoj por munti pontojn,turojn,domojn,eĉ veturilojn kun elektra motoreto.Tio estas pli taŭga ol aliaj ludiloj kiuj devas esti malpermesataj vendi.

La homo,poste li pasis la infanecon kaj la junecon,estas kiam sia cerbo cerbumas pri kio estas la homa vivo,kaj vidas la nunan junularon el kiuj estas iuj kiuj estas nomataj "jejuloj" kaj ne povas esti akceptataj de la homa socio.Tiaj gejunuloj devus labori pli kaj studi anstataŭ pasigi la tempon kun sia muzika ritmo kies melodioj naŭzokreas,kiuj ankaŭ sen havi belan voĉon pretiĝas kanti kaj moviĝi kvazaŭ ili estus negruloj.

Do gejunuloj pripensu por la morgaŭa tago, lasu tiujn distraĵojn,estas aliaj pli indaj ol tiuj de la "jejuloj".

Nenio pli,pardonu se mi esprimis min tiel; okazas ke mi jam estas avo kaj rememoras kiam mi estis juna.

JAIME MIRO

..........................................................

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&-

KORESPONDA SERVO

-Juna instristino (28 j.) Interesiĝas pri nia lando kaj popolo;ŝanĝus gramofondiskojn de muziko kaj bildkartojn: Eva Peskova, Bezrucova 1. Zabreh. ĈEĤOSLOVAKIO.-

-16 jara knabino.Interesiĝas pri nia popolo. Interŝanĝas poŝtkartojn: Raina Dimitrova Georgieva. u.Mihajlovgrad.str. Kiril kaj metodij 32,BULGARIO.-

-19 jara tekstilteknikisto petas gekorespondantojn: Johny Jordan, Verd 161,VRHNIKA,JUGOSLAVIO.-

-22 jara instruistino deziras korespondi : Marialva de Lourdes Melo. Patos de Minas,Rua Major Gote 727,Minas, Brazilo.-

-Maria Tomaŝovicova,ul ktp Ubira 927,Nove Mesto nad Vah,ĈEĤOSLOVAKIO.-

-Interesiĝas science pri integraciaj tendecoj kaj pri mondfederalismaj movadoj kaj agadoj en esperantaj kaj ne esperantaj medioj :Maria Kaspevska, Krakov,ul Sovereiewskiejo 19, POLLANDO.-

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Bonvolu sendi la korespondpetojn al :
S-ro Josep Serrano, Mercería 7-3.Tarragona,HISPANIO

)o)o)o)o)o)o)o)o)o)

## - III-a INTERNACIA ESPERANTISTA AMIKECA RENKONTO

## 30 .IX.1967 -Bystrzyca Klodzka -Polando

La 30-an de septembro 1967 /sabato/ okazos en Bystrzyca Klodzka la III-a Internacia Esperantista Amikeca Renkonto,kiun partoprenos partoprenantoj de la III-a Internacia Esperantista Ferio en Miedzygorze, situanta nur 13 Km de Bystrzyca,kaj speciale alvenintaj polaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Pliaj informoj riceveblaj de:Pola Esperanto-Asocio,Bystrzyca Klodzka,pl.Wolnosci 1. POLLANDO/

^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^

## -EUROPA JUNULARA KONFERENCO-

En "La Dromedaro" okazos Eŭropa Junulara Konferenco de la 19-a ĝis la 29-a de aŭgusto 1967 pri la temo "Miljara lukto kontraŭ la maro.-Problemoj kaj procedoj de moderna polderigo en Nederlando".

Organizantoj; Nederlanda Esperanto Junularo (NEJ) kaj Germana Esperanto-Junularo (GEJ).

-Kotizoj: 160 ned. gld. por la tuta konferenctempo (ekskluzive unu fakultativan ekskurson); okaze de nekompleta restado oni reduktos la kotizojn je 10 ned.gld. por ĉiu mankanta tago.

Aliĝoj : estas sendendaj al Nederlanda Esperanta Junularo, p/a Win Jansen,Rontgenstras 32a Vlaardingen,Nederlando.kaj kotizoparto de 20 ned. gld. estas samtempe aŭ ĝirenda al la poŝtĉekkonto de NEJ 71 99 30 aŭ sendenda pôŝtmandate al Wim Jansen.

Limdatoj : Aliĝojn NEJ akceptos nur ĝis la 15a de julio 1967.

Limigo: La nombro da partoprenontoj estas limigita al 52 personoj,ĉar ne estas pli da litoj en "La Dromedaro".Krome kelkaj hotelaj kaj privataj ĉambroj estas disponeblaj.

"La Dromedaro" estas kolosa konstruaĵo el 1540 kaj ĝi troviĝas en Enkhuizen,ĉe la bordo de la Ejsela lago.La urbo Enkhuizen,kiu estas riĉa je bone konservitaj malnovaj konstruaĵoj,situas en belega regiono for de la brua mondo,55 kilometrojn norde de Amsterdamo.

"La Dromedaro" povas gastigi plej diversajn kunvenojn de la internacia studentaro;ĝi estas moderne,praktike sed simple ekipita,tute adaptita al la etoso kaj la karaktero de la 16-jarcenta fortikaĵo.Ĝi disponigas 52 litojn en pluraj ĉambroj, varman kaj malvarman akvon,sep dušejojn kaj centran

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

hejtadon.La celo estas bone kaj malmultekoste gastiĝi studentojn,artistojn kaj ĵurnalistojn-kaj la progresigo de internaciaj kontaktoj kaj de arto.

Ĉiujare deko da ekspozicioj estas aranĝata kaj okazas koncertoj kaj filmaj kaj teatraj prezentoj.

Ankaŭ por turisto La Dromedaro estas alloga pro siaj situo kaj ekipaĵoj:en la bufedo oni povas konatiĝi kun homoj el la tuta mondo,ludi pianon kaj tablo tenison,nenifari sur la 30 metrojn alta tegmenta teraso,naĝi en la Ejsela lago,velŝipi,remi,akvoskii,bicikli,promeni kaj ludi miniaturan golfon.

Impresiĝi de la etoso en kvieta Enkhuizen,paŝeti tra pitoreskaj stratoj kun multaj domoj el 15a kaj 16 a jarcentoj,rigardi la ŝipplenan havenon kun la interesa Zuiderzee-muzeo kaj la vigla fiŝvendejo; ekskursi al la Okcidentfrisa Bazaro,la Fromaĝvendejo en Alkmaar,la dunoj,la arbaroj kaj strandoj de Bergen kaj Schoorl;al Radboud en Medemblik,la Wieringermeer-poldero,la Fermdigo kaj ŝipveturoj al Urk Staveren kaj la polderido de Zuiderzee

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## ESPERANTO EN LA ETERON

En la sidejo de la Vroclava Esperanto-Klubo estas instalita kurtonda amatora radiostacio.La stacion priservas 15 esperantistoj radioamatoroj.
La elvoksigno de la stacio estas SP-6-PAM.

Oni povas ekligi kontaktojn kun la radiostacio ĉiun sabaton kaj dimanĉon en la vesperaj horoj laŭ GMT.

Adreso: Kurtonda Esperanto-Klubo ,SP-6-PAM, Wroclaw-17,str.Dubois 3,Poŝtkesto 8,Pollando

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-
-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## =ESPERANTA VERKISTO MORTIS=

( Budapest.-) La 18-an de marto mortis ĉi tie unu el la plej sukcesaj originalaj verkistoj en la Internacia Lingvo Esperanto: Julio Baghy. Kun sia samlandano Kálmán Kolacsay, Julio Baghy faris -laŭ la ĝenerala opinio de literaturistoj -pli ol kiu ajn alia krei konservindan originalan literaturon en Esperanto, kiun li parolis de sia 20ª jaro ĝis la morto, 76ª jara.

La originalaĵoj de Baghy - kvin romanoj, kvar poemaroj, tri noveloroj kaj diversaj aliaj volumoj atingis grandan popularecon, kaj pluraj, krom en esperanto, ankaŭ en diversaj nacilingvaj tradukoj. Liaj lernolibroj de Esperanto por hungaroj atingis kune eldonkvanton de 40,000 ekz. La lasta poezia volumo "Ĉielarko" aperis nur kelkajn semajnojn antaŭ lia morto.

?-!-?-!-?-!-?-!-?-!-?

## 4ª JUNULARA ORATORA KONKURSO

Denove la Junulara Sekcio de H.E.F. organizas "Junularan Oratoran Konkurson " kiu okazos en la kadro de la 28ª Hispana Kongreso de Esperanto okazonta en Zaragoza

Ĉiuj GEJUNULOJ povos paroli pri kia ajn temo de ili preferata .

Pliajn informojn donos al vi la HEJS-prezidanto. Salvador Aragay, Arce 8-2-4, Cornella.

Partoprenontojn sendu vian aliĝon rekte al la sekretariino de HEF. S-ino. Inés Gastón Marina Moreno 35-4. Zaragoza.

Ni atendas vian aliĝon al la Kongreso kaj al la Konkurso.

H.E.J.S.Estraro

## ATENCION

Con pesar, anunciamos desde esta página el cierre de la Delegación de HEJS en Barcelona en el local social de Radio Club Cataluña, calle Casanova 57 6 planta. Por ello rogamos a los clubs y asociaciones en general que nada envien a la mencionada dirección pues hasta la nueva reorganización de la Delegación no se dispondrá de local social. Provisionalmente invitamos a todos los consocios asistan a las tertulias del Instituto Español de Esperanto en la plaza de España s/n (instituto Municipal de Educación) 4 piso de 7 a 8,30 horas, de esta forma no se perderán los contactos de la junta y asociados muy esenciales en vistas al Congreso Internacional Juvenil de TEJO en Tarragona.

Agradecemos desde estas páginas la ayuda y colaboración desinteresada de la junta de Radio Club Cataluña y en especial al Sr. Presidente Guixá y vocales Srs. Fiol y Urriens por las deferencias que han tenido con nuestra delegación y deseamos en nombre de todos los asociados de HEJS en Barcelona y propio que las actuales dificultades en que atraviesa Radio Club Cataluña sean superadas rápidamente.

Barcelona HEJS-Junta

NOTAS DE SECRETARIA

Socios que han abonado la cotización. Srs. Ignacio Peguera, P. José Claramunt, Grupo Villanueva y Geltrú Carmelo Bello, Instituto Francisco Franco, José de la Cruz y Juan Escuenaga y Ricardo Sans.

Nuevo Socio. Ignacio, Peguera

Se ruega a los abonados del Boletín que no hayan satisfecho su cotización la abonen al cajero Sr. Jose Sanz Madrid 163-3-3 Barcelona 14. Asimismo durante el Congreso en Zaragoza se efectuarán los cobros que se deseen.

-o-o-o-o-o-o-

Lignaĵoj CANET.—Por la servo de la konstruado. Str. Cort, 41. T. 306.

Apotekisto L. M.ª HERNANDEZ IZAL, en Sant Pau d'Ordal.—Je la servo de la bona sano en la regiono. A. 83 (Vilafranca del Penedès). T. 13.

Filatelisto BOLET.—Interŝanĝo de poŝtmarkoj. Placo Juan Alvarez, 35. T. 156. A. 14.

Presisto YSART.—Konstruado de skatoloj el kartono. Str. Oviedo, 5. T. 333.

Mebloj FELIU.—Sortimento por oficejoj, geedziĝoj kaj ĝeneralaj ornamaĵoj. Str. José Antonio, 19. T. 543.

Trinkejo SPORT.—Kafoj kaj malvarmtrinkaĵoj. Promenejo Nuestra Señora, 49. T. 718.

Vinagroj DURAN.—Aromigitaj el herboj, ellaborado el pura vino Str. Comercio, 36. T. 11.

GRAU.—Amatora fotografisto. Str. Benach, 4. T. 865.

ĈAMPANO, RAVENTOS CATASUS.—Aŭtentika kelo. Oni provizas kun etiketoj en Esperanto. Str. San Pedro, 8. T. 108.

Aŭtomobiloj S A N J O R (Renta-Car).—Taksimetroj. Luo sen ŝofero. Str. Amalia, 24. T. 580. J. Sogas Muntané.

SEGUI MÜLLER.—Advokato Filatelisto. Str. G. Cortijo, 22. T. 523.

CASAS.— Feraĵvendejo-Kristaloj-Vitroj-kaj materialoj por la konstruado. Str. Ferrers, 3. T. 42.

GIRALT.—Pentristo de aŭtomobiloj. Av. Tarragona, 40. T. 459. - Kaj Str. Amalia. 85. T. 385.

SANS Bicikloj kaj motorcikloj. — Ĉiuj specoj por geinfanoj kaj plenkreskuloj. La eksterordinara motorciklo OSSA, la plej moderna por sportadi Modernaj TURNILOJ por la konstruado de industriaj aferoj, laŭ deziro Str. Tarragona, 16. A. 118. T. 458.



MADERAS
CALLAU

Sans, 302 - Teléf. 239 05 24

BARCELONA (14)

jovani

PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 205 11 83
HOSPITALET - BARCELONA

ZURCIDORA

y

TEJEDORA
ROSITA GALBANY

VENDO RETALES

J. Cardellach

A